

## & Epikuraca kanto:

< Rekante 18 el 35 batoj por strofo, entute 245 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929) kun indiko: (Laŭ germana melodio "Studio auf seiner Reis"). Baladigis Martin Strid (2016) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por "Vilaĝanino".>

### (#Melodio:

<:35 > (

/LaLa doLa Tido relTi; rere doTi Lado La; LaLa doLa Tido relTi; rere doTi Lado La

(#Rekantaĵe: a;mi mi3re doTi rere mi; mi3re doTi rere mi; LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado LaLa a;)

)×7 )+

### (&Strofoj:

'1 /Sciu nun, samidean', ; Ke dependas via san' ; De regula bonhumor', ; De ĉiama senlabor'!

(×.; **Ho, bonan aŭdu nun rakonton ; Sonu laŭde kun la fonto ; Plankon paŝe, drume draŝe ; Estu interhoma ponto.)**

'2 Laŭ spertita homa kon' ; Plej utila estas mon' ; Tial do naskiĝu vi ; En riĉega famili'! .....

'3 La virinoj, jes, en ver' ; Taŭgas tre por am-afer' ; Prunteprenu sen cinik' ; La edzinon de amik'! .....

'4 Kaj por peli zorgojn for ; Taŭgas ĉiam la likvor', ; Tial trinku kun kuraĝ' ; Eĉ dum plej maljuna aĝ'! .....

'5 Al sanigo de l' stomak' ; Helpas ĉefe la tabak', ; Tial fumu dum la viv' ; Pli eĉ ol lokomotiv'! .....

'6 Kaj se malgraŭ la princip' ; Ne plu fumas via pip', ; Estas tial, ke sen dub' ; Malpurigis ĝia tub'! .....

'7 Vivu am' kaj bonhumor', ; Kaj tabako kaj likvor'! ; Post la vivo kun enu' ; Dormos ni en tomba tru'! .....